**Kalkulo kun katastrofo**

Laŭ la Brita jurnalo *Lancet*, en la lasta kvarono de la jaro 1998 mortis naŭ homoj pro nova varianto de la *Creutzfeldt-Jakob*-malsano. Antaŭe oni registris maksimume kvin mortintojn po jarkvarono. Esploristoj atribuas la malsanon al la kaŭzanta aganto de Bova Spongeca Encefalito (BSE).

Post 1995, en Britio mortis entute 39 homoj pro tiu malsano. Kiel tre timigajn la esploristoj taksas la novajn datumojn el francaj zoologiaj ĝardenoj. Tie, teamo de la universitato Montpeliero ekzamenis dudek hazarde selektitajn lemurojn. En ĉiu de tiaj mamuloj el la ordo de primatoj, la sciencistoj trovis 'prionojn', kiel nomiĝas la kaŭzantaj agantoj de la malsano. Du el la 20 animaloj jam malsaniĝis; ili estis ricevintaj ĝis 1996 BSE-infektitan nutraĵon. (Fonto: *DIE ZEIT* n-ro 15, 1999-04-08, p.39)

**Malaperas marbordaj strandoj**

En Majorko mortas la banstrandoj, ĉar ilia ekosistemo estas difektita. Tion asertas almenaŭ profesoro *Jaume SERVERA* de la Universitato de la Balearoj. "Ni perfortis niajn strandojn" diras la fakulo. Vento kaj ondoj forportas la sablon ĉar ne plu funkcias la naturaj protektmeĥanismoj. La duna sistemo estas tute rompita ĉar la konstrulinio troviĝas tro proksime laŭlonge de la strandoj, kaj ĉar pro estetikaj kaŭzoj oni regule forigas la zosteron. Krom tio la konstruo de havenoj, digoj, gabaro kaj aliaj maraj instalaĵoj konsiderinde ŝanĝis la marfluon. Sed ankaŭ kulpas pri la malapero de la strando la turismo: ĉiu unuopa turisto vole aŭ nevole forportas 30 gramojn da sablo dum unu tago per siaj banuzaĵoj kaj stranda ilaro.

Ŝutamasigo de sablo (la vilaĝo *Magaluf* ekzemple ricevis inter 1986 kaj 1995 pli ol 250,000 kubikmetrojn) nur malmulte helpas. Ofte ĝi nur enterigas la valoran zosteron, aŭ estas tuj forlavita. Krome, la sablo mankas tie kie ĝi estas fordragita. Tiaj aktivadoj ĉiukaze estis sensencaj, daŭrigis s-ro *Servera* al la loka gazeto *Mallorca Magazin*, ĉar ili ne alportos daŭran utilon kaj devos esti ripetataj 'dum daŭro de kelkaj jaroj'. (Fonto: *Werra Rundschau* n-ro 16, 1999-04-18, p.40)

**Oni timas plialtiĝon de perforteco**

Pri pli da violenteco en la evolulandoj timas la Germana 'Fondaĵo Mondpopulacio' kiel nerekta sekvo de la daŭra kreskado de la monda loĝantaro. Dum la venontaj 50 jaroj, la loĝantaro sur la Tero kreskos je minimume tri miliardoj da homoj al entute naŭ miliardoj. "Manko da akvo kaj grundo tiam fariĝos 'nutromedio' por konfliktoj", diris s-ro *Hans FLEISCH*, aferdirektanto de la Fondaĵo.

Dum la loĝantaro de la industrinacioj kreskas malpli ol 1% jare, la nombro de la enloĝantoj de Afriko duobliĝos ĉiujn 25 jarojn. Tial ekestos tie evidenta malabundo de varoj. "En la jaro 2050 trioble pli ol la nuna homamaso devos dividi inter si la saman kvanton da akvo kiel hodiaŭ" klarigis s-ro *Fleisch*. "La sekvo estos fortaj migradaktivadoj kaj plua urbanizado en la koncernaj ŝtatoj kun tute novaj etnaj kunmetoj. Tio neeviteble kondukos al perfortecaj konfliktoj".

La Fondaĵo postulas, informi pli da homoj ol ĝis nun pri familiplanado. Ĉirkaŭ 300 milionoj da geedzaj paroj tute ne havas aliron al la ebleco de preventiloj. La rimedoj en la porevolulandaj buĝetoj de industrilandoj devos esti aligrupigataj kaj transtavoligataj. Eŭropo devas plialtigi la politikajn rimedojn por tiaj dense loĝataj regionoj kaj uzi sian internacian influon. (Fonto: *dpa*)



**Lamoj gardas Britajn ŝafojn**

Kraĉantaj lamoj protektas en Britio ŝafaron kontraŭ vulpoj. La ĵurnalo *'Sunday People'* raportis, ke la kamparano *Chris Davidson* ne plu perdis eĉ unu el siaj 700 ŝafoj, ek de kiam gardadas ilin la lamopatrino *Lobelia* kun siaj du idoj *Conchita* kaj *Simon*.

Laŭdire la lamoj kraĉante kaj tretante forpelas la vulpojn, kiuj antaŭe fortege ŝtelĉasis ŝafojn. "Lamoj estas tre gardemaj. Ili aŭdas ĉiun fremdan brueton kaj ekvidas ĉian strangan movon" diris la 52jaraĝa farmisto. Ili jam eĉ estis mortigintaj unu vulpon. (Fonto: *dpa en Main Post* n-ro 83, 1999-04-12, p.16)

**Globalizado**

Globalizado estas la mondvasta interplektiteco de la monda ekonomio. Kiel tute nova trajto kompare al la ĝisnuna internacia labordivido, la monda komerco kaj la ekesto de multnaciaj konzernoj de la pasintaj jardekoj, la spertaj ekonomiistoj konsideras, ke ekde la 90aj jaroj la tuta mondo fakte jam estas scenejo de mondmerkata aktivado, kaj ke en daŭre kreskanta rapideco elformiĝos ununura monda ekonomio.

La antaŭkondiĉoj por tio estas

- post la disfalo de la Orienta Bloko kaj la komenciĝo de merkatekonomia disvolviĝo en Ĉinio nuntempe fakte ekzistas sur la tuta Terglobo principe la sama ekonomia ordo;
- multaj doganlimoj ĉesis ekzisti (ekzemple en la enlandaj merkatoj de Eŭropo) kaj ankaŭ aliaj malhelpoj de la libera mondomerkato estis forigitaj, per kio la grandaj entreprenoj povos translime projekti sian produktadon, subkontraktadon, financadon kaj merkatevoluigadon;
- la internacie ligita komputilteĥniko kune kun la forigo de ŝtata reguligado kvazaŭ astronome kreskigis la mondvastan financmerkaton. En 1998 ekzemple la ĉiutaga devizokomerco estis laŭvalore pli ol 1125 miliardaj eŭroj.